AKTUALA ESPERANTO - INFORMILO MONATA DE LA ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO

N° 6 / 2011 Junio

# aktuala ESPERANTO




36-a ELDONJARO Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de **Esperantista Brusela Grupo**, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "*reĝa*" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com. Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

**Abona membriĝo nur por adresoj en Belgujo, 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 ; Eltiro 150 ekzempleroj.**

Informoj : www.esperantobruselo.org ; aktuala.retejo.net ; br11.leadhoster.com ; ebg.skynetblogs.be ; uea.org ; paulo.retejo.net ; barelo.blogspot.com ; esperanto.net ; esperanto.be ; lernu.net ; liberafolio.org ; eo.eventeo.net

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

## ENHAVO

Paĝo 3 - Kotiz-tabelo; Fotaĵaro de koncerto Kapriol kaj de agado EBG
Paĝo 5 - Poemaro de Kalocsay, Garcia Orive, Alcântara, Jakvo
Paĝo 7 - Biografieto de elstara esperantisto Kálmán Kalocsay
Paĝo 8 - Raportoj de Augusto Casquero kaj de Eduardo Kozyra
Paĝo 10 - Clay Magalhães vojaĝis al Vietnamujo por prepari UK 2012
Paĝo 11 - Pri Ortodoksismo, Katolikismo kaj Protestantismo
Paĝo 17 - UEA membraro; Maskerado denove eldonita
Paĝo 18 - Dafydd ab Iago Fergus pri Herman van Rompuy

## PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

**Majo 2011**

04 Marcel Delforge pri lia Transsiberia Vojaĝo al Ulanbatora Kongreso
11 José Augusto Pinto de Sousa pri Tradukado en Eŭropaj Institucioj
*14* Sabata Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo
18 Eduard Kusters pri la Belga Kompromiso: ekzisto, historio, nuna situacio
*20-22* PEKo - Semajnfina Printempa E-Kunveno de APE en Mozet apud Namur
25 Nelly Bracke kaj Tom el Skotlando deziras prezenti esperantan filmon

**Junio 2011**

01 Eric Baert prelegas pri lia laborado en eksa Belga Kongo dum 1963-1967
08 Vladimira Chvatalova pri Vojaĝoj tra Benino, Togolando, Ganao kaj orfejo Nabouba
15 Angelos Tsirimokos prelegas pri Origino de la Kalendaro kaj de la Semajno
22 Semajna kunveno
*28-2.7* 70a Hispana E-Kongreso en San Lorenzo de Escorial, Madrido
29 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci



## KOTIZ-TABELO 2011

| Nro | Kodo | Kategorio kaj Kotizo | € | Rajtoj |
|---|---|---|---|---|
| ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO | | | | |
| 11 | MEM | Membro de EBG | 10 | Abono al "Aktuala" (organo de EBG) + partopreno en la vivo de la Grupo |
| 12 | MEM-R | Membro-junulo (ĝis 26-jara) | 5 | |
| 13 | MEM-S | Membro-pensiulo, senlaborulo | 7 | |
| 14 | FAK | Familia kunloĝanto | 2 | Partopreno en la vivo de la Grupo |
| 18 | DVM | Dumviva membro de EBG | 250 | Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo ( 25 X MEM kotizo ) |
| BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ | | | | |
| 21 | APE | "Association pour l'espéranto" | 14 | Membro+Abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva) |
| 22 | FEL | Flandra Esperanto-Ligo (FEL) | 25 | Membro+Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva) |
| UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO | | | | |
| 31 | SA | Abonanto de "Esperanto" | 38 | Abono al "Esperanto", monata organo de UEA |
| 32 | Kto | Abonanto de "Kontakto" | 23 | Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA |
| 33 | MJ | Membro kun "Jarlibro" | 25 | Membreco en UEA + "Jarlibro" |
| 34 | MA | Membro-abonanto de UEA | 61 | MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato ! |
| 35 | MG | Membro kun "Gvidlibro" | 10 | Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj) |
| 36 | SZ | Membro de Societo Zamenhof | 122 | Honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEA |
| 37 | MD | Dumviva Membro de UEA | 1525 | MA de UEA dum la tuta vivo! ( 25 X MA kotizo ) |

**Kara membro de EBG, bonvolu pagi tuj 10€ abonkotizon 2011 al konto 000-0 123 048-52**

## FOTAĴARO DE EBG :



Koncerto de **Kapriol** vendrede, la 15an de Aprilo, 20an horo, donacita de **EBG** en Kulturcentro Maalbeek, 97 rue du Cornetstraat : **http://br11.leadhoster.com/110415/**



Prezentantoj nederlande, esperante kaj france (José Augusto, Angelos, Françoise)


Gespektantoj de la koncerto de **Kapriol** vendrede la 15an de Aprilo


Komencanta enkonduka kurso la 6an de Aprilo


Progresanta perfektiga kunveno la 6an de Aprilo



Prelego de Bernard-Regis Larue (li dekstre) pri astronomio la 6an de Aprilo




Ankoraŭ prelego de Bernard-Regis Larue la 6an de Aprilo


Komencanta enkonduka kurso la 30an de Marto (instruistino Françoise dekstre)


Progresanta perfektiga kunveno la 30an de Marto


Veterana kunveno la 30an de Marto (Angelos, Michael, Georgia)

# POEMARO:

## VIAJ OKULOJ

Ekzistas okuloj kiel la suno,
brilantaj; okuloj, kiel ĥimera
nokto; okuloj, kiel senespera
vido; kaj glaciaj, kiel la luno.

Ekzistas kiel terurega faŭno,
voluptaj okuloj; kaj, de mistera
esprimo kiel la diino Hera,
aŭ koleraj kiel l' dio Neptuno.

Estas okuloj de melankoliaj
tristoj, plenaj de rigardo-disperso.
Sed, Regina, kiel la okuloj viaj,

mi povas diri per mallerta verso,
ke estas neniu, ĉar nur en tiaj
rigardas sin, la tuta universo.

Alberto Garcia Orive, Bilbao, 11.2.2011

## PARALELE

“La vojoj niaj sekvas paralele”
- vi ofte, sen bedaŭro, al mi diris.
Kaj mi akceptis, ĉar ni interstele,
sen timo kaj kun ĝoj’, antaŭeniris.

Plenaj je revoj, trovis niaj koroj
tra l’ mondo nur da am’ kaj fantazi’.
Kaj, en esperĝarden’ plena je floroj,
en mia penso nur troviĝis vi.

Sed mi rimarkis, kiom da malsamo
en niaj revoj estis. Via amo
montriĝis nur miraĝo por trompito.

Kaj tiun belan amon mi ne savis,
ĉar vi pri paraleloj certe pravis:
kuniĝas ili... nur ĉe l’ Infinito!

Laura Alcântara, Brazilo
tradukis Sylla Magalhães Chaves

## EL SEKRETAJ SONETOJ

Por la unua, dolĉa foj': deflori,
kaj poste: nupti, karnon miksi, trui,
seksumi, kaj koiti, kaj geĝui,
kopuli, kohabiti kaj amori.

Enpafi, ŝtopi, vosti, grotesplori,
palisi, kaj bambui, kaj geglui,
kunkuŝi, kaj interne intervjui,
bombardi sube, mini, lanci, bori.

Kaj broson brosi, glavon karnan ingi,
buteron kirli, sondi, piŝti, piki,
kamenbalai, inan ingon klingi,

surpingli, karnon planti, truon fliki,
la brulon per la akvotub' estingi,
tranajli, spili, ŝargi, farĉi, fiki.

Kálmán Kalocsay(1892-1976), 1932

## FLUGAS EN LA AERON

Liberigita folio flugas en aeron
mara venteto ŝin disŝiris per dolĉa blovo,
Sento amara, folio rekte en inferon
Rilatis nur pri dancado de la bosanovo.

Multaj freŝaj ventoj eĉ ventegoj sin postsekvis
dancigas ŝin la tango aŭ nova Piazzola,
vestita preskaŭ nuda aŭ de tempo en surplis’
sed ĉiam plenkolora plejofte pli frivola.

Karega folio sen formo de eleganto
tristege ŝi ekflugis fortege singultante,
kuŝas prefere inter amika amaranto.

Denove dancado, ne laŭ bambo sed galanto
moviĝas ŝi plej pintsupre ol aerflugante
kie ŝi karesis lin la ĉiama amanto.

Jakvo Schram, Antverpeno 18-08-2009



## IRAS ABITURIENT'

Dum splena hor', ĉagrena hor'
Ĉe l' kor' min ekkaresis
Arĝentsonor' de l' rememor'
Pri l' tempoj, kiuj ĉesis.

Ĝojriĉa temp', feliĉa temp'
De l' knab' facilanima!
Ho, viv-abund' en korprofund'!
La viv' estas senlima!

Senpena sort' kaj plena fort',
Amika rondo varma!
Kortuŝa fid', plenbuŝa rid'
Pri ia farso ĉarma!

Ho, ora viv', ĝojflora viv',
Flugiloj ĝojfrapantaj!
Malĝoj' kaj dub'? Facila nub'!
Projektoj dolĉe vantaj!

Studenta temp'! Ho, venta temp'!
Aĝ' de printempa vento,
Aĝ' de April': en blanka bril'
Burĝonas knabosento:

Naiva am'. Je kiso jam
La lip' soifa estas
Kaj per admir' la amdezir'
La amatinon vestas.

Naiva poz': he, sen ripoz'
Nur supren sur deklivo!
Infana sonĝ', ho, vana sonĝ',
Ĉar vekas zorg' de l' vivo...

Reportu brilon al la malĝojkanto,
Malnova, kara kant', adiaŭkanto:

Iras abiturient'
Jam for...
Adiaŭ, kamarad-taĉment',
Jam for...
La voj' alhejma antaŭ mi,
Filistro estos ankaŭ mi.
Jam for... al voj'...
Ni kisu nin je l' lasta foj'.

Infan-sonĝ', ho vana sonĝ',
Ĉar vekas zorg' de l' vivo,
Kaj svenas ĝoj', kaj venas voj'
Malsupren sur deklivo.

En juga dev' la fluga rev',
La sonĝa mond' ekpalas,
Flugila sving' sen cel-ating'
Lamiĝas, kaj - ni falas.

Nenie sav'. Eĉ ama rav'
Ne helpas por leviĝo,
Ĉagrenos nin, ke venos fin':
Aŭ tromp', aŭ senreviĝo.

Kaj post esper' la malprosper'
Eterna kaj rigida,
Splenigas nin, plenigas nin
Per saĝ' vinagr-acida:

Por kio lukt'? Acida frukt'
Ja estas la espero,
Kaj ĝi de sur branĉ' sen matur'
Defalos al la tero.

Do, lasu nur: viv' pasu nur,
Ĉar estas ver' ordona,
Ke estas mond' kaj restas mond'
Malĝoja kaj malbona.

Ho, ploru, ploru kun la ekploranto,
Malnova, kara kant', adiaŭkanto:

Iras abiturient'
Jam for...
Adiaŭ, kamarad-taĉment',
Jam for...
La voj' alhejma antaŭ mi,
Filistro estos ankaŭ mi.
Jam for... al voj'.
Ni kisu nin je l' lasta foj'.

Kálmán Kalocsay(1892-1976)

## Kalocsay
## Elstara Esperantisto

Kálmán (Kolomano) Kalocsay (*ka'lma'n KAloĉai*) (6-a de oktobro 1892 en Abaújszántó – 27-a de februaro 1976) estis hungara Esperanta poeto, tradukisto, kaj redaktoro kiu multe influis la evoluon de Esperanto-literaturo kaj de la lingvo mem. Liaj pseŭdonimoj: *C. E. R. Bumy, Kopar, -y, Alex Kay, K. Stelov, Malice Pik, Peter Peneter*. Kalocsay studis medicinon kaj poste fariĝis la ĉefa infektologisto ĉe grava Budapeŝta hospitalo. Onidire li lernis kaj Esperanton kaj Idon adoleske sed ekkliniĝis al la unua kiam li vidis pli grandan potencialon literaturan. Kalocsay skribis: "*En 1912 mi funde trastudis la gramatikon kaj vortaron de Ido. Tiam mi sciis Idon same bone kiel Esperanton. Sed mi neniam partoprenis en la Ido-movado, nek verkis ion en Ido: mia interesiĝo estis pure lingva kaj ĉesis post la ellerno de mia Ido-libro.*" En 1921, oni eldonis lian unuan originalan volumon poezian, *Mondo kaj Koro*. Plia jardeko pasis antaŭ la apero de lia kolekto *Streĉita Kordo*, kiun oni konsideras unu el la plej elstaraj kolektoj de originala poezio en Esperanto. Ankaŭ aperis *Rimportretoj* - spritaj rondelformaj poemoj pri pluraj tiamaj movadaj gravuloj. Plejmultaj pensas, ke li ankaŭ estis la verkinto de *Sekretaj Sonetoj* (erotika sonetaro) sub pseŭdonimo Peter Peneter.



Kálmán Kalocsay (1892-1976)

Kalocsay gvidis la literaturan mondon de Esperanto pere de la revuo kaj eldonejo nomitaj *Literatura Mondo*. Kaj tiu grupo de verkistoj kiuj formiĝis ĉirkaŭ la revuo dum la dudekaj kaj tridekaj jaroj, nomiĝis la Budapeŝta Skolo. La verkoj de Kalocsay pri literatura kaj lingvika teorio inkludas la ampleksan verkon *Plena Gramatiko de Esperanto*, kaj *Parnasa Gvidlibro*, ellaboritajn kun Gaston Waringhien, kaj la pristilan gvidlibron *Lingvo Stilo Formo*. Kalocsay kunverkis la du-voluman *Enciklopedio de Esperanto*. Pri Kalocsay multe verkis kaj prizorgis lian postlasaĵon Ada Csiszár, post kies morto la postlasaĵo transiris al la Esperantomuzeo de la Aŭstruja Nacia Biblioteko.

Laŭ Vikipedio



## Maljunuloj ne balastas!



Ĉu maljunuloj estas balasto? Ofte oni pensas ke maljunuloj estas balasto, ke ili utilas por nenio, ke ili ĝenas, ke ili ne kapablas lerni.
Sed, kia eraro! Mi instruas Esperanton nuntempe en Hanojo (Vietnamujo). Mi havas grupojn kiuj konsistas el junaj universitataj gestudentoj. Sed ankaŭ mi havas du grupojn kiuj konsistas el maljunuloj. Kaj, surprizo. Miaj maljunuloj kun junaj koroj (sed kun maljunaj oreloj) estas bonegaj lernantoj. Neniu povus pensi ke ili ne kapablas lerni, ke ili ne estas utilaj al la socio. Kaj rilate la movadon, ke ili ne povas helpi. Sed tute kontraŭe, ili lernas Esperanton bonege. Eĉ du el ili, 74 kaj 78 jaraĝaj lernas samtempe Esperanton kaj hispanan lingvon. Ĉiuj ĉiam atentemaj, lernemaj, laboremaj. Ĉiam bone kaj diligente faras la hejmtaskojn de mi proponitaj. Ridemaj, ĝentilaj, afablaj, eĉ ĉiutage ili plej afable preparas por mi kafon. Kaj ĉiuj estas pretaj helpi en la organizado de la UK kiu okazos venontjare en Hanojo. Nemalhaveblaj ili estos certe. En la klaso mi uzas nur Esperanton, sen iu ajn problemo. Ili bone komprenas Esperanton kaj tute ne havas problemon kun la altnivela gramatiko. Kia plezuro labori kun ili! Ni lernu de ili! Ĉi-antaŭe mi aldonas foton de la grupo. En ĝi mankas la plej maljuna 93-jaraĝa. Starante dekstre maldeksten: Eterna 85-jaraĝa (koro kaj animo de la grupo), Radio 84, Prospero 90, Augusto (la instruisto ne diras aĝon), Valoraĵo 74 (ĉefa organizanto de la kursoj). Sidante dekstre maldekstren: Beletristo, 78, Sepo, 83, Famulo, 78.

Augusto Casquero, Majo 2011

## Kantono omaĝas Zamenhof




La 16an de aprilo 2011, en la sidejo de la Asocio de Esperanto de Kantono (Ĉinuja Popola Respubliko) okazis omaĝo al la memoro de kreanto kaj majstro de Esperanto, Doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof. La salono de la asocio estis plenplena de samideanoj kaj gelernantoj. Eĉ ne estis sufiĉe da sidlokoj por ĉiuj ĉeestantoj. Parolis pri la Majstro nome de la loka movado s-ro Petro Ye, kaj kiel gasto Augusto Casquero de la Cruz, instruisto de Esperanto el Valencio, naskiĝita en Caceres, Estremaduro, Hispanujo. Oni prezentis diversajn fotojn de la tombejo de Zamenhof en Varsovio,

aŭskultigis lian surbendigitan voĉon, kaj poste kanton de Georgo Handzlik "*Mi volas danki vin*". Grupo da ĉinoj kiuj intencas partopreni ĉi-somere la UK-on en Kopenhago, ankaŭ ĉeestis la aranĝon.




Kiel kutime en ĉiuj tiuj aranĝoj, oni abunde fratece manĝis kaj trinkis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn alportitaj de la partoprenantoj. Iomete tro malfrue, kiam jam multaj ĉeestantoj forestis, oni faris komunan fotadon ĉi-tie prezentata.

La aranĝo estis tre sukcesa, kortuŝiga, emociplena, kun etoso samideana. Multaj ĉeestantoj renkontiĝis denove kun malnovaj amikoj, kaj ĉiuj deziris daŭre labori por la disvastigo de Esperanto kaj por la bono de la movado.

Augusto Casquero de la Cruz, Valencio, Hispanujo

## CIVITANA PLATFORMO AKTIVAS

Kazimiro Krzyzak kaj Eduardo Kozyra, maldekstre dekstren en la unua foto, anoj de politika partio EDE-PL Platforma Obywatelska, Pola Civitana Platformo, aktivas en la Oficejo de Pawel Orlowski Parlamentano de Civitana Platformo en Pola Sejmo.



Ili tri priparolas la someran E-aranĝon en Parko de la Mondo la 30an de junio 2011 en Malborko kadre de 2a GES. Dum la evento, la japana mecenato Etsuo Miyoshi ricevos la prezidantan ŝtatan ordenon de Pollando pro la promociigo de pola kulturo. Enmanigos ĝin la Pomeria Vojevodo Roman Zaborowski. Tio okazos laŭ iniciato de Pola Civitana Platformo. Dum la renkontiĝo kun la deputito de Pola Sejmo Pawel Orlowski oni priparolis ankaŭ la peticion pri Esperanto en lernejojn.

Sur la dua foto maldekstre Arkadiusz Mroczkowski staras kun la antaŭe menciitaj tri, temas pri Malborka Prezidanto de Urba Konsilantaro de Malborko, granda amiko de Esperanto.



Sekve la supre du menciitaj anoj de Pola Civitana Platformo, Kazimiro kaj Eduardo, renkontiĝis kun la Membro de Eŭropa Parlamento Joanna Senyszyn ano de Alianco de Demokratia Maldekstrularo (Sojusz Lewicy Demokratycznej - SLD) en ŝia Parlamenta Oficejo en Gdinio kaj poste kun membro de Eŭropa Parlamento Jan Kozlowski el Civitana Platformo, en lia Parlamenta Oficejo en Sopoto, pri la promociigon de Esperanto dum la Pola Prezidanteco de Eŭropa Unio. Eduardo Kozyra raportis, Aprilo 2011



## CLAY EN VIETNAMUJO

Brazilano Clay Magalhães, UEA Konstanta Kongresa Sekretario, vizitis Vietnamujon en Aprilo por informiĝi pri la preparlaboroj de la UK 2012, kiu okazos en Hanojo.



Alveno de KKS Clay Magalhães

Ene de tiu vizito, li volis koni la lokon kie okazos la IIK - Internacia Infana Kongreseto. Li estis tre favore impresita kaj kortuŝita de tiu vizito. Je lia alveno, la infanoj kaj deĵorantoj de la infanĝardeno VSK (Vietnamaj Superinfanoj), en du vicoj, portante flagetojn de Esperanto kaj de Vietnamujo, varme ricevis lin kriante "Saluton". Komuna fotado okazis tuj poste, kun la infanaro, instruistinoj, deĵorantoj kaj organizantoj. La direktorino de VSK, animo kaj ĉeforganizanto de la IIK, Bela Maro, talenta esperantisto, akompanis Clay por viziti la infanĝardenon. Ĝi estas bela, moderna, bone ekipita, tre taŭga por la okazigo de tiu aranĝo. Oni devas sciigi ke granda parto de la personaro de la infanĝardeno, instruistinoj, kuiristinoj, ge-oficistoj, entuziasme lernas Esperanton por pli bone helpi la infanojn. Unue nun ili lernas, kaj poste ili instruos Esperanton al la infanoj.



Komuna fotado kun Clay Magalhães



Clay Magalhães kun la ĉefaj organizantoj



Bela Maro, koro kaj animo de la IIK, kaj Augusto, hispana instruisto de Esperanto

Por la IIK oni esperas ricevi infanojn de la tuta mondo. Ili certe estos dorlotitaj ĉi-tie, kaj revenos hejmen feliĉaj pro la neforgesebla sperto travivita.

Ĉiuj estos bonvenaj, sed speciale la infanoj de la najbara lando Ĉinujo, ĉar oni esperas ke ili amase venos al Hanojo, Vietnamujo.

Augusto Casquero de la Cruz raportis

# Ortodoksismo

**Ortodoksismo :**

Estas la tria plej granda branĉo de kristanismo, havante 214 milionojn da anoj, precipe en orienta Eŭropo kaj okcidenta Azio. (Du aliaj branĉoj, la katolika kaj la protestanta, havas respektive 1027 kaj 316 milionojn). Ĝi estas la orienta, greka branĉo de kristanismo, kiu havas 11% da ĉiuj kristanoj. Ĝi estas la ĉefa formo de kristanismo en Grekujo, Rusujo, Belarusujo, Ukrainujo, Rumanujo, Bulgarujo, Serbujo, okcidenta Azio, kaj iuj aliaj landoj.

**Historio :**

La ortodoksa kaj katolika branĉoj estis unu nura eklezio ĝis la Granda Skismo de jaro 1054. Depost 476, kiam la Okcidenta Roma Imperio ĉesis ekzisti, la okcidenta kaj orienta eklezioj grade kreskis aparten, ĝis 1054, kiam la orienta (ortodoksa) eklezio ne plu toleris la ĉiam pli kaj pli grandiĝantan pretendon de la papo (la episkopo de Romo) je supera aŭtoritato en la eklezio. La papo fariĝis tro potenca kaj kulture barbara, en la senso ke li ne plu tiel respektis la kulturaj tradicioj de la universala kristana religio.

Kaj ĉi tio ja estas **la kriza malsamo inter la ortodoksismo kaj la katolikismo**: en la katolikismo la plejalta aŭtoritato estas la papo, dum en la ortodoksismo similan aŭtoritaton posedas nur la ekumena koncilio, ĉiu episkopo estas egala al ĉiuj aliaj.



Geografia disvastigo de ortodoksismo

**Doktrino:**

La baza kredo de la Eklezio estas resumita en la Kredo Nicea, de la Koncilio de Niceo en jaro 325. Ortodoksismo kredas ke la Biblio estas la sankta vorto de Dio, kaj sekvas la interpreton de la Grekaj Patroj (pensintoj kaj sanktuloj) de la frua eklezio. Ortodoksismo restas, ĉiam ĝis nun, fidinda al la veroj de la unuaj sep tutmondaj koncilioj (kunvenoj de la tutmonda episkoparo por decidi pri punktoj de doktrino kaj praktiko), estinte tre konservema depost tiam pri doktrino. Laŭ tio, la eklezioj armena, kopta, nestoriana kaj jakoba en la oriento, kaj protestantaj en la okcidento, estas herezaj, ĉar ili ne rekonas la tutan veron de la sep koncilioj. La eklezio katolika, aliflanke, ja rekonas la sep konciliojn, sed bedaŭrinde la papo, la episkopo de Romo, abuze tutsola aldonis doktrinon post la sep koncilioj, tial katolikismo ankaŭ pro tio eraras. Ortodoksismo ne agnoskas la aŭtoritaton de la papo super ĉiuj Kristanoj, kaj nur pro tio esence malsamas al katolikismo.

**Simileco al katolikismo:**

Ortodoksismo ne agnoskas la tiel nomata "Petreca Funkcio" de Petro apostolo, la unua papo, laŭ kio la



papo en Romo posedas aŭtoritaton super ĉiuj Kristanoj. Sed aparte de la papeco, la malsamo inter la ortodoksa kaj la katolika plejparte temas pri emfazo, ne pri esenco. Ekzemple, kvankam plejmultaj ortodoksanoj kredas ke Maria ĉieliris, tio ne estas oficiala dogmo kiel en la katolika eklezio. Simile, dum la katolika eklezio teorie konsentas kun la ortodoksa doktrino pri diservo per ikonoj (t.e. bildoj de Jesuo, de sanktuloj kaj de anĝeloj kiuj enestas la diservojn, la diajn preĝojn kaj la sakramentojn), praktike tia diservo estas malofta aŭ eĉ rara inter katolikoj. Tial laŭ katolikismo, ortodoksismo ne estas herezo (malsamo de doktrino) sed estas skismo (malsamo de politiko). Katolikismo rekonas la sakramentojn de ortodoksismo, tamen ne inverse, pro politikaj kialoj, ne pro teologiaj kialoj.

**Sakramentoj:**

Ortodoksismo neoficiale rekonas la sep sakramentojn aŭ "misterojn" (la greka vorto por sakramento) oficiale agnoskitaj de katolikismo:

**1: bapto ;**
**2: konfirmacio ;**
**3: komunio ;**
**4: konfeso ;**
**5: geedzigo ;**
**6: ordino ;**
**7: sanktoleado .**

**Moralo:**

La baza moralo de ortodoksismo kiel de ĉiuj kristanoj, estas la Dekalogo de Moseo, t.e. la dek ordonoj de Moseo, precipe kiel klarigitaj de Jesuo en la evangelioj.

**Organizo:**

Ortodoksismo ne estas ununura centrigita eklezio sed ĉeno de landaj eklezioj, kiuj havas la samajn doktrinon, kanonaron kaj sakramentojn. Ĉiu episkopo (estro de la eklezio por urbo aŭ gubernio) estas egala al ĉiuj aliaj. Tamen historie kelkaj urboj rolis pli grave, precipe ĉefurboj (metropoloj), kaj ĉirkaŭ ili formiĝis metropolitujoj kaj patriarkujoj. Tiun ordon regulas unu el la kanonoj de la Ortodoksa Eklezio, nome la 34a Apostola regulo: "*Episkopoj de ĉiu popolo devas koni la unuan inter ili kaj agnoski lin kiel ĉefon, kaj nenion ekster ilia aŭtoritato fari sen lia scio. Ĉiu el ili faru nur tion, kio rilatas lian eparĥion kaj lokojn, kiuj apartenas al ĝi. Ankaŭ la unua nenion faru sen ĉies scio. Ĉar tiel regos samideeco...*". Tiel formiĝis sendependaj ortodoksaj eklezioj, ĉiu el kiuj havas propran ĉefon - la unuan inter egalaj. La titoloj de la unua episkopo varias laŭ landoj, plejparte tio estas patriarko, sed povas esti ankaŭ metropolito aŭ ĉefepiskopo.

**Eklezioj:**

Krom la origina eklezio de Konstantinopolo (antaŭa Bizanco, hodiaŭa Istanbulo), ekzistas 14 aŭtokefalaj (aŭ memkapecaj aŭ sendependaj) kaj 3 aŭtonomaj (aŭ memstaraj) ortodoksaj eklezioj, kiuj kutime ĉiam estas listigitaj laŭ jena sinsekvo pri historia graveco, ne pro kvanto de anoj:

**1. Konstantinopola -**
sidejo en nuna Istanbulo, Turkujo

**2. Aleksandria -**
sidejo en Aleksandrio, Egiptujo
**3. Antiokia -**
sidejo en Damasko, Sirujo
**4. Jerusalema -**
sidejo en Jerusalemo, Palestino
**5. Rusia -**
sidejo en Moskvo, Rusujo
**6. Kartvela -**
sidejo en Tbilisi, Kartvelujo
**7. Serba -**
sidejo en Beogrado, Serbujo
**8. Rumana -**
sidejo en Bukureŝto, Rumanujo
**9. Bulgara -**
sidejo en Sofio, Bulgarujo
**10. Kipra -**
sidejo en Nikozio, Kiprujo
**11. Greka -**
sidejo en Ateno, Grekujo
**12. Pola -**
sidejo en Varsovio, Pollando
**13. Albana -**
sidejo en Tirano, Albanujo
**14. Ĉeĥa-Slovaka -**
sidejo en Prago, Ĉeĥujo
**15. Amerika -**
sidejo en Novjorko, Usono
**16. Sinaja (*aŭtonoma*) -**
sidejo de Kairo, Egiptujo
**17. Finna (*aŭtonoma*) -**
sidejo en Kuopio, Finnlando
**18. Japana (*aŭtonoma*) -**
sidejo en Tokio, Japanujo

**Aliaj eklezioj :**

Tamen ekzistas aliaj eklezioj, ofte skismaj, kiuj aldonas al tiu organizado. Ekzemple en Ukrainujo la plejmulto de la preĝejoj kaj monaĥejoj obeas la rusan Patriarkon de Moskvo, tamen ekzistas du aliaj gravaj centjaraj ortodoksaj minoritataj skismaj pure ukrainaj (ne rusaj) eklezioj kiuj obeas, unu iun patriarkon, kaj alia iun aŭtokefalan ĉefepiskopon, ambaŭ de Kievo (ukrainlingve Kijivo). Krome, tie en Ukrainujo tre gravas ankaŭ la tiel nomata grek-katolika uniata eklezio de Ukrainujo, kiu fakte estas tiel ortodokseca kiel la tri aliaj laŭ ritoj, moroj, tradicioj kaj organizo, kun la nura diferenco ke obeas la papon de Romo tra siaj episkopoj ĉefitaj de tiu de Kijivo. Ĝi, la grek-katolika uniata, estas la dua plej grava enlanda eklezio pro kvanto de anoj kaj de kirkoj, tuj post la rusa.

**Ortodoksaj preĝejoj :**

Sub episkopo estas la sacerdoto aŭ pastro de ĉiu preĝejo. Li predikas kaj faras la sakramentojn. Li rajtas edziĝi antaŭ ordino, sed ne episkopoj nek monaĥoj. La spirita centro de ortodoksismo ne estas la episkopoj, sed la monaĥoj kiuj praktikas mistikan kristanismon konsideratan severan kaj idealan. Ofte ene de orienta ortodoksisma preĝejo (kirko, cerkvo) rimarkeblas malĉeeston de seĝoj aŭ benkoj (seĝoj ekzistas en nunaj preĝejoj katolikaj, ofte benkoj en preĝejoj protestantaj), sed Ikonostazon ĉeestas, tio estas vando kovrita de ikonoj kiu kaŝas la altarejon kien la pastro eniras tra videblaj pordoj. Tamen manko de seĝoj aŭ benkoj ne estas afero tipe ortodoksa, ĉar ekzemple la grekoj havas plejofte benkojn en siaj preĝejoj.

Laŭ Vikipedio



## KATOLIKISMO

Vastasence katolikismo estas la kristana religio, bazita sur la dogmaro kaj ritaro difinitaj de la 7 unuaj koncilioj kaj precipe en la kredkonfeso de la Koncilio de Niceo en jaro 325. Malvastasence katolikismo estas la kristana religio, bazita sur la dogmaro kaj ritaro difinitaj de ĉiuj ĝisnunaj koncilioj kaj agnoskanta la aŭtoritaton kaj neerarablecon de la papo. La vorto katolikismo originas el la greka lingvo signifanta: apartenanta al la tuto, tio estas universala. Tiu vorto menciiĝis unuafoje en jaro 110. Romkatolika eklezio estas la konkreta formo de la katolikismo, kiu konsistas el 24 malakordaj branĉoj. Inter ili la plej granda estas la okcidenta aŭ latina eklezio, la ceteraj nomiĝas orientaj eklezioj. Inter la plej konataj neromkatolikaj kristanaj eklezioj estas: Ortodoksa, Luterana, Anglikana, Metodista, Episkopa, Prakatolika Eklezio, kaj multaj aliaj. Estro de la romkatolika eklezio estas la episkopo de Romo, la papo, konsiderata posteulo de la plej grava apostolo Sankta Petro. La Sankta Triunuo (aŭ Triopo) estas kredo en la bazo de la katolika diobildo laŭ kio en la unusola Dio estas 3 personoj: Patro, Kristo kaj Sankta Spirito.
Nuntempe ene de la katolikismo oni strebas al unuiĝo de kristanoj kaj diskutas pri samseksemo, aborto, eŭtanazio, pastroj pedofilaj.

Laŭ Vikipedio

## PROTESTANTISMO

Protestantismo (ekis 1517) estas la dua plej granda branĉo de kristanismo, havante 16% de la kristanoj. Ĝi estas la ĉefa formo de kristanismo en norda Eŭropo, norda Ameriko, Oceanio kaj suda Afriko. Ĝi estas esence la norda, ĝermana branĉo de kristanismo. Protestantismo ne estas unuigita eklezio sed svarmo de eklezioj, kiuj devenas historie de la ribelo de Lutero, germana monaĥo, kontraŭ la tiama diboĉado de la Katolika Eklezio, la tiel nomata Protestanta Reformacio. La du ĉefaj fondintoj de protestantismo estas Lutero kaj Kalvino. La vorta esprimo Protestantismo estiĝis en la periodo de la Reformacio kaj devenas de la Latina vorto *protestari = atesti (pri sia fido)*. La Protestantismon fakte oni povas dividi en kelkajn grandajn grupojn de eklezioj:

- la eklezioj kiuj devenas de la Anabaptismo, origine anarkiisma movado kiu poste trankviliĝis ekzemple en la mondvasta disigita movado de la Menonitoj
- la movado kiu estiĝis ĉirkaŭ Lutero: Luteranismo
- la movado kiu estiĝis ĉirkaŭ Kalvino: Kalvinismo
- la skismo liu estiĝis ek de la politika disputo inter angla reĝo Henriko la 8an kaj roma papo, kreinte la Anglikanismo kaj eliĝintaj memstaraj eklezioj kiel Episkopanismo, Metodismo, ktp
- pluraj eklezioj plej ofte ĉe Kalvinismo, displitiĝis en novajn (sub)ekleziojn dum internaj

diskutadoj kaj disputoj pri la puritanismo en la religio
- en la 19a kaj precipe en la 20a jarcento ĉefe en Brazilo kaj Usono ekestiĝis multaj *novaj protestantaj eklezIaj movadoj*, kiel ekzemple Adventismo, Atestantoj de Jehovo, Pentekostismo, ktp.

**Doktrinaj trajtoj:**

Kun la aliaj du ĉefaj branĉoj de kristanismo (la romkatolika kaj la ortodoksa), la protestanta branĉo kredas en la **Kredo Nicea**, al kiu pluraj protestantaj grupoj aldonis aŭ interpretis siajn kredkonfesojn pli novajn, krom la Liberala Protestantismo, kiu tute principe ne konas devigan kredkonfeson.

La tri doktrinoj de Lutero kiuj plejmulte bazas la kredon de la protestantismo estas:

**- *sola fide* (nura fido)**
**- *sola scriptura* (nura sankt-libro)**
**- universala pastraro**

Tio ebligas protestantojn libere plenprave forlasi la eklezion, laŭ sia propra konscienco, laŭvole se necese, ĉar ili ne bezonas nek ĝin nek pastrojn por doktrino aŭ por sakramentoj. Anstataŭe ĉiu kredanto rajtas legi la Biblion kaj preĝi al Dio, por kaj per si mem ne bezonante pastron aŭ eklezion kiel peranto inter si kaj Dio.

**La protestanta Biblio:**

Sankta Biblio uzata de ĉiuj kristanoj havas du partoj: Malvova Testamento kiu malsamas laŭ branĉo kaj Nova Testamento kiu esence samas. La protestantoj uzas la hebrean Malnovan Testamenton plej ofte laŭ la kanono de Kalvino dum la romkatolika kaj la ortodoksiaj eklezioj uzas la judan Malnovan Testamenton laŭ la Septuaginto. Tamen la katolikoj ne havas ĉiujn librojn kiujn konservis la Ortodoksio. En la generacio post Jesuo Kristo, la rabenoj faris kanonon pri la Hebrea Biblio, en kiu pluraj verkoj de la Septuaginto ne plu estis akceptitaj, ĉu ĉar ili ekzistis nur en la Greka lingvo, ĉu ĉar ili estis tro malfrue verkitaj. Tial ĉi tiuj libroj (nomitaj ĉu Duakanonaj Libroj ĉu Apokrifoj) ankaŭ mankas en la protestanta (pli precize kalvinana) biblio: Tobit, Judit, Makabeoj (1, 2, 3 kaj 4), Saĝeco, Siraĥido kaj pluraj aliaj. La Luteranoj, tamen, kutime havas en siaj Biblio-eldonoj la Duakanonajn Librojn de la Okcidenta tradicio.

**Sakramentoj kaj ritoj:**

La ***Bapton*** praktikas plejparte ĉiuj protestantaj eklezioj. En la plimulto de la protestantaj eklezioj, same kiel en la ortodoksia kaj rom-katolika tradicio, la bapto samtempe funkcias kiel metodo por membriĝi en la koncerna eklezio. Por Menonitoj tio estas klara kialo por rifuzi la bapton al infanoj. Nur post konfesado de sia fido, tiam kiel plenkreskulo oni rajtas esti baptita. Male, laŭ la Remonstrantoj, la bapto nur membrigas en *la Eklezio de Kristo*. Konkreta membriĝo en difinita eklezio estu komplete disigita de tio-ĉi.

La ***Manĝon de la Sinjoro*** aŭ ***Sanktan Vespermanĝon*** celebras



preskaŭ ĉiu protestanta eklezio. La romkatolikoj nomas ĝin kiel la ***komunio.*** Kvankam la plimulto kredas ke Kristo iel ĉeestas ĉe la komunio, eĉ se nur simbole, tamen iliaj ideoj pri tio diverĝas. Sed ĉiuj protestantoj malkonsentas kun la ideo pri transsubstancigo ke la substanco de la pano kaj vino vere fariĝas la korpo de Kristo (kvankam la ekstera aspekto restas sama) tipe rom-katolika (ankaŭ ne rekonata de la Ortodoksio). En pluraj protestantaj eklezioj la komunio kutime okazas ĉiumonate aŭ jarkvarone. Kelkaj eklezioj (la Remonstrantoj jam depost jarcentoj) konsciante ke "*nin invitas la Sinjoro*" tute principe invitas kiun ajn ĉeestanton ĉu baptitan ĉu ne. Aliaj limigas la inviton partopreni nur al siaj propraj membroj laŭ la tradicio de ortodoksio kaj de romkatolikaro.

La ***legado el la Biblio***, preĝado kaj predikado estas la centro de protestanta Diservo (ne estas komunio), ĉar ĝi instigas la fidon.

La plimultaj eklezioj konas la riton de nupto kaj ordino de pastoroj aŭ pastorinoj, sed plejparte ne konsideras tion kiel sakramento.

***Eksedziĝo*** estas tolerata en la praktiko de la protestantismo, sed fakte la celo estas jam nur por teni pura la idealon de la nupto. En kreskanta nombro da eklezioj la nupto inter gejaj paroj estas samranga kiel nupto de tradiciaj aliseksaj paroj.

***Pentofaradon*** tre gravas en Luteranismo.

**Aliaj protestantaj kredoj:**

Alkoholo kaj tabako estas malpermesata de kelkaj sektoj aŭ eklezioj protestantaj. Adoradon de ***Sanktuloj*** estas nekonata kaj abomenata de protestantoj. Oficiale ne ekzistas protestantaj sanktuloj sed eĉ la liberala protestantismo (foje konsiderata ekstremisma) havas *kvazaŭ-sanktulojn*, homojn konsideratajn gravajn ekzemplojn kiel Dietrich Bonhoeffer. La protestantoj ne preĝas al sanktuloj (nek al Maria, patrino de Jesuo), kies adoradon en la romkatolika tradicio ili ofte spertas kiel blasfemon, kiel trakto de idoloj aŭ diaĵetoj mise anstataŭante la unika vera Dio. La tradicion pri ***Monaĥoj*** protestantismo ne havas kaj abomenas. La komunumo de Taizé en Francujo povus esti konsiderata ekscepto sed ĝi estas principe ekumena. Branĉoj de liberala protestantismo konsideras Jesuon kiel sankta saĝa homo, sed nur homo, nepre ne Dio, kaj plimulto tutmaniere pensas ke tiu afero estas ne vere grava. Pro tio kaj alio, laŭ kontraŭuloj de protestantismo, des pli liberala, ĝi ne estas *vera* kristanismo, sed nura modernismo.

**Esperantistoj :**

La Kristana Esperantista Ligo Internacia, **KELI**, estas la esperantista ligo de protestantoj.

La Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, **IKUE**, fondita en 1910, estas la ĉefa esperantista katolika organizo.

**http://keli.chez.com/**
**http://www.ikue.org/**

Laŭ Vikipedio

## UEA MEMBRARO

Estis 5288 individuaj membroj de UEA en 2010. En 2009 ili estis 5713. Okazis do malkresko de 425 membroj. UEA registris novan malrekordon de la nombro de individuaj membroj post la dua mondmilito. La antaŭa estis 5702 en 2008. La falo ja estis antaŭvidebla pro la malgrandeco de UK en Havano, kiu tamen klarigas ĝin nur parte. La evoluo plu estas same negativa ankaŭ ĉi-jare. Kvankam ĉi-jare UK estos pli granda ol pasintjare, la 31-an de marto 2011 estis malpli da individuaj membroj ol fine de marto pasintjare: 4297 nun kaj 4463 antaŭ unu jaro (minuso de 166). Verŝajne la jarfina nombro superos 5000, sed ne estas certe, ĉu ĝi superos 5100. Jen la nombroj de unuopaj kategorioj fine de marto (parenteze marto 2010): Membro kun Gvidlibro 233 (251), Membro kun Jarlibro 1095 (958), Juna MJ 133 (118), Membro-Abonanto 1831 (2091), Juna MA 50 (88), Dumviva Membro 795 (794), Juna DM 15 (19), Dumviva Membro kun Jarlibro 76 (73), Juna DMJ 9 (9), Honora Membro 53 (55), Honora Patrono 7 (7). Ĉefe dank' al la pli granda UK en Kopenhago la nombro de MJ kreskis per 152, sed aliflanke tiu de MA falis 298. Pri tiu malkresko parte "kulpas" Fondaĵo Canuto, kiu pro manko de mono remembrigis 52 pasintjarajn MA-membrojn ĉi-jare kiel MJ. Krome, aliaj 56 MA, kiuj mem pagis sian kotizon, ĉi-jare pagis kiel MJ. Parto el ili eble preferas legi la revuon rete; aliaj malkontentas pri ĝi, mankis al ili mono aŭ estis alia kialo. Se ni ne enkalkulas tiujn 108 MA, kiuj nun estas MJ, la falo de MA estas 190, t.e. preskaŭ dekono de la pasintjara nombro. Aldone, samproporcie falis ankaŭ la nombro de simplaj abonoj (sen membreco), nome de 99 al 90. La falo de MA-membroj estas konstanta: pasintjare ĝi estis 244. Laŭ mi estas evidente, ke malkontento pri la nuna redakta koncepto de "Esperanto" negative influas la membroevoluon. Ĝi ne estas la sola faktoro, sed certe grava. Iuj faktoroj estas ekster nia povo kaj ni ne povas influi ilin per niaj decidoj. Iujn aliajn ni ja povas influi kaj tion ni ankaŭ klopodu fari. La revuo de UEA apartenas al ili kaj ni devas kuraĝe alfronti la defion fari la necesajn decidojn kaj agojn por provi turni la nombron de ĝiaj ricevantoj al kresko.

Osmo Buller

---

## MASKERADO ELDONITA

Lanĉita estas reeldono de *Maskerado* de Tivadar Soros. La 12-an de aprilo 2011 en Novjorko festo okazis por lanĉi reeldonon de la anglalingva traduko de la Esperanto-verko de Tivadar Soros *Maskerado ĉirkaŭ la morto.* La verko pritraktas la sukcesan transvivon de la familio Soros en Budapeŝto. La festo, en la hejmo de la financisto George Soros, filo de Tivadar, kunvenigis grupon de elstaraj intelektuloj de la regiono,



inter ili reprezentantoj de *New York Times,* la ĉefredaktoro de *New York Review of Books,* pluraj verkistoj, kaj la konata televida komentariisto Bill Moyers. Ĉeestis ankaŭ fakuloj pri Esperanto kaj interlingvistiko Esther Schor kaj Arika Okrent. Ĉefa parolanto estis Humphrey Tonkin, kiu, en sia rolo kiel tradukinto, havis la taskon prezenti la libron kaj paroli pri ĝia ekesto. Tion farante, li kaptis la okazon, antaŭ atenta aŭskultantaro, paroli pri Esperanto kaj ĝia formiĝa rolo en la vivo kaj pensado ne nur de la patro sed ankaŭ de la filoj Soros. La libro aperis originale en Esperanto en 1965 kaj en dua eldono en la jaro 2000 – la jaro de aperigo (en Britio) de anglalingva traduko de Humphrey Tonkin. Poste aperis tradukoj ankaŭ en la germanan, rusan, hungaran kaj turkan, kaj estas en preparo tradukoj italan kaj ĉinan. Usona eldono aperis en 2001, tiun eldonon oni nun ree aperigas en Novjorko ĉe la eldona grupo Skyhorse. George Soros estis surpriza vizitanto en decembro en lanĉa festo de traduko de alia libro de la patro, *Modernaj Robinzonoj,* ankaŭ tradukita de Tonkin (titolata kiel *Crusoes in Siberia*). La grupo Esperanto por UN organizis tiun feston.

**Tivadar Soros.** *Masquerade: The Incredible True Story of How George Soros' Father Outsmarted the Gestapo.* **New York: Arcade Publishing. 2011. 275pĝ.**
**Tivadar Soros.** *Crusoes in Siberia* **and** *The Fairest Judgment.* **New York: Mondial. 2010. 31+93pĝ.**

Herman Deceuninck, Dumviva membro de EBG,
28.4.2011 < herman.public @ clearwire.be >

---

## LA SENDANĜERA BONHUMORA ĈEFO DE EŬROPO

**Ekster Eŭropo oni surpriziĝis. Kiel oni povas elekti senvizaĝan nekonatan politikiston fronte al la monde konata kaj sperta Anthony Charles Lynton Blair, eksa ĉefministro de Britujo? Usonaj, japanaj kaj aliaj diplomatoj en Bruselo havas multe da malfacilaĵoj por klarigi, kiel Eŭropo faras decidojn pri la postenoj. Post tiom da militoj kaj pro tiom da nacia fiereco — certe de la grandaj Eŭropaj nacioj — ŝajne nepras elekti iun, kiu certe ne minacos, nek aŭdacos. Pli gravas, ke Eŭropaj ĉefoj plu venos al Bruselo kaj staros antaŭ la televidkameraoj.**



Herman Van Rompuy

Tia homo estas la nova prezidanto de la Eŭropa Konsilio Herman Van Rompuy, eks-ĉefministro de Belgujo. Li venkis, kie la eks-ĉefministro de Britujo Tony Blair fiaskis, kaj li fariĝis la ĉefo de la Eŭropa Konsilio, la kuniĝo de la Eŭrop-Uniaj ĉefoj. Sed la “elekto” (ne okazis publika voĉdonado) de Van Rompuy, kaj de lia nekonata subulo Catherine Ashton, montras kiom feroce la Eŭropaj ĉefoj

gardas ne nur sian povon sed ankaŭ la aliron al televidkameraoj. Ili ne volis fortan unuan prezidanton de la Eŭropa Unio.



Catherine Ashton kun Van Rompuy

"Nek sinjoro Van Rompuy nek baronino Ashton estas tiuj, kiujn oni nomas graveguloj. La elekto de ili indikas preferon por malpli ambicia komenco de ĉi tiuj postenoj", — komentis Jonny Dymond, korespondanto por *BBC News* en Bruselo.

Van Rompuy akceptis la prezidantecon la 1an de decembro 2009. Kiel la unua posedanto de la prezida posteno en la Eŭropa Konsilio, li havos gravan efikon al siaj posteuloj. La unuaj agadoj de Van Rompuy, kiu travojaĝis Eŭropon, jam montras ke li estos malambicia. Liaj alparoladoj dum la vizitoj de la Eŭropaj ĉefurboj ja indikas lian grandan zorgon ne ofendi aŭ tuŝi iun ŝtaton. En Slovenio li promesis "kontinuecon" kaj "koherecon". En Milano Van Rompuy parolas pri "zorga aŭskultado" kaj konsiderado de la interesoj kaj senseblecoj de ĉiuj. En Bruselo Van Rompuy konfesas al ĵurnalistoj, ke li ne faros iun ajn politikan deklaron dum la unua monato.

La prezidanto de la Eŭropa Konsilio estas "elektita" por la periodo de du jaroj kaj ses monatoj. Ekzistas ebleco renovigi la oficon nur unufoje. Kvankam la nova ofico estis elpensita por doni homan "vizaĝon" al la Eŭropa Konsilio, oni jam havas dubojn pri ĝia efikeco.

La mallonga periodo de ofico nur donas la okazon al la postenenhavanto ekkoni la dosierojn kaj labormanierojn. Sed ĝuste tiam la oficHavanto devos forlasi la postenon.

Eŭropo, kuniĝo de 27 landoj kaj pli ol 500 milionoj da homoj, nun havas la "ĝustan" homon por ĝin gvidi. Ĝi "elektis" homon kiu ofendos neniun.

Simile okazis la "elekto" de la alia pinto-posteno — Alta Reprezentanto de la Unio pri Eksterlandaj Aferoj kaj Sekureca Politiko de la Eŭropa Unio. Simile al Van Rompuy, oni ne komprenis ekster Eŭropo: kial oni elektis duarangan politikistinon Catherine Ashton fronte al aro da aliaj eblecoj. Dum certa tempo eĉ la nuna brita eksterlandministro estis menciata.

"Kiom respektinda kaj amika ŝi eble estas, ŝi ne ŝajnas taŭgi al la ideala profilo de Eŭropa ministro pri eksterlandaj aferoj", — diris observanto.

La Ondo de Esperanto. 2010. №1 (183)
Redaktis Dafydd ab Iago Fergus



## LILA LOISSE



**La plej juna aktiva membro de Esperantista Brusela Grupo**